

## DIABLO, MORTO KAJ INFERO – TRI TABUOJ EN LA EKLEZIO

Tekstpartoj el konkluda prelego de Helmut Matthies en la kongreso de la kristanaj manaĝistoj en Lejpcigo, Germanio

Kiam temas pri la estonteco de la kristanoj, ni parolas pri tabuo. Mi konas neniun sinodon el la lastaj jaroj, kiu okupiĝus per tiuj ĉi temoj: lasta juĝo, ĉielo, infero, aŭ eĉ Antikristo. Dume al nia estonteco estas dediĉita tuta libro kun 22 ĉapitroj: Apokalipso de Sankta Johano – malkovro de spiritaĵoj veraj pri la estonteco de la kristanoj. Por multaj tiu ĉi lasta libro de la Sankta Skribo sin montras kiel nekomprenbla. Sekve de tio ĝi estas malmulte legata. Sed mistere sonanta parolo de la Apokalipso havas sian fonon: „Apokalipso de Sankta Johano“ estas la libro verkita en la tempo de granda persekutado de la unua kristana komunumo en la fino de la unua jarcento. Ĝi estis lagata en la kristanaj komunumoj, kie sidis ankaŭ denuncantoj el la roma imperio. Tial estas en ĝi multo esprimita kiel siaspece sekreta skribaĵo. Kaj kodo por ĝia ekkompreno troviĝas en la Malnova Testamento. Por la unuaj kristanoj tio ne estis problemo, ili estis konsciantaj siajn hebreaĵajn radikojn, dum por paganaj Romanoj estis la hebrea Biblio nekonata. La aŭtoro de la Apokalipso estas disĉiplo de Jesuo Kristo, la apostolo Johano. Kaj kiel li ankaŭ ni atendas post ĉieleniro de Jesuo lian alvenon. Sed antaŭ ol al ni Jesuo denove venos, kaj tio estas por multaj kristanoj speciala tabuo, ekaperos granda kontraŭludanto de Dio – Antikristo. Kiu estas tiu antagonisto, pri tio ekestis dum la historio diversaj imagoj. Dum reformacio por Lutero Antikristo estis papo. Lia kunlaboranto Melanchton vidis Antikriston en turkoj, kiuj minacis per konkero de Eŭropo. Laŭ novtestamenta atestaĵo kaj antaŭ ĉio laŭ Apokalipso la Antikristo sin montras per tri manieroj.

### 1. Totalitara ŝtato kiel Antikristo

Antaŭ ĉio ĝi estas la totalitara ŝtato (Apo

12-13). Dum ni povas libere agadi en Eŭropo, en la mondo vivas 200 milionoj kristanoj, kiuj estas diskriminaciataj en islamaj, hinduismaj, budaismaj aŭ komunismaj landoj. Ĉiusemajne mortas ĉirkaŭ mil kristanoj konsekvence de la persekutado. Ekzistas multaj kristanoj, kiuj tion travivis dum komunista hegemonio en kelkaj landoj de Eŭropo.

### Komunisma reĝimo

Ekzistis longa tempo, kiam kristanoj, kiuj ne aniĝis al la komunistaj asocioj de la junularo, ne havis aliron al studado, maturekzameno, al kariero. Nuntempe ili ofte havas pli malgrandajn pensiojn ol laborantoj de iama STB (ŝtata komunistaj polico) kaj komunistaj funkciuloj. Ili travivis tion, kion priskribas Apokalipso: diktaturon, kiu postulas submetiĝi al ideologio. Kompare kun tiuj, kiuj vivis libere en Okcidento, ili havis unu avantaĝon: ili travivadis tion, kio estas antaŭdirita por fino de la tempoj.

Multaj kristanoj en tiu superregateco vivis laŭ la devizo: „Restu surloke kaj ĉiutage defendu sin!“ Ili ne lasis sin forlogi, sed kondukis la aliulojn al Kristo. Tio estas gvidaj fortoj laŭ Dia volo. Tio, per kio diferencas la kristana kongreso de la manaĝistoj disde la aliaj manaĝistaj kongresoj, estas tio ĉi: la kristanoj unualoke ne celas al politiko kaj pozicio, al la plej alta salajro. Ni scias, ke Diaj kriterioj estas tute aliaj ol la kriterioj de tiu ĉi socio. Tio, kio „en la mondo“ estas opiniata kiel perdita, por Dio povas esti tio la plej ĝusta vojo. Tio, kio aspektas kiel vivo, kiu multon ne atingis, ĝuste povas esti la vivo, super kiu jubilas la anĝeloj en la ĉielo.

### Konsequencoj por la libereco

Jam preskaŭ du dekjarojn ankaŭ en Oriento ni povas vivi libere. Kiujn konsekven-

cojn ni rezultu el tio? Antaŭ ĉio ni klopodu pri libereco de la kristanoj persekutataj en aliaj landoj, kaj tion per preĝoj kaj protestoj. Ni informiĝu kaj elzadu nian liberecon.

Antaŭ nelonge aperis en Germanio libro, kiu al si metis la demandon: Kio okazus, se GDR (iama Orienta Germanio) ne kuniĝus kun Federacia Respubliko, sed se la orientgermanaj komunistoj transprenus regadon ankaŭ en la Okcidento? Tio ja estis dezirego de la komunistoj. Poste ne estus en malliberejoj nur 200 mil civitanoj, kiuj ne samopi-niis, sed en kvinoble pli granda nacio tio estus proksimume unu miliono.

## 2. Kapitalismo kiel Antikristo

En kia masko hodiaŭ la Antikristo minacas Eŭropon? Unu germana gazeto skribas pri la nuntempa situacio: „Tia amasigo de la kriminala konduto, netravideblaj kaj dusencaj manipuladoj inter la plej alta ekonomia gvidantaro en la historio de Germanio neniam ekzistis. Kio do okazis kun niaj la plej saĝaj kapoj, el kiuj kelkaj evidente tute perdis sencon pri la moderemo kaj dececo kaj tute senhonte ili dividas al si fremdan monon desupre ĝis suben“? Kial la mono iĝis ĉefrivalo de Dio? Ĉar ne temas pri peceto da metalo, sed pri la koro. La problemo ne estas la mono, sed amo al la mono.

Ne hazadre oni diras: „Montru al mi bankan kontreltiron, kion en la via vi faras regule por la homoj en mizerstato kaj por Dia regno, kaj mi al vi diros, je kio vi kredas.“ Jesuo Kristo tion diris unusence: „Kio utilos al la homo, se per sia mono li akirus la tutan mondon, sed pereigos sian animon?“ Monavidecon la Nova Testamento nomas „radiko de ĉiu malbono“ (1 Tim 6,10).

Antikristo povas enesti do ne nur en la diktatorecaj sistemoj, sed ankaŭ en kapitalismo (Apo 17-18). Sed Jesuo montras elirvojon, kiun Gerhard Maier indikas kiel „general a celo“ de la tuta savhistorio: „Pli feliĉe estas doni ol ricevi“ (Ago 20,35). Avareco, krom tio, ke ĝi estas morbida avido, estas

ankaŭ la peko kaj povas kaŭzi malsanon.

Kiu volas resti anime sana, tiu engaĝiĝu por helpi aliulojn. Jesuo tion diras en Monta Prediko: „Tiel via lumo lumu antaŭ homoj, por ke ili vidu viajn bonajn farojn, kaj gloru vian patron, kie estas en la ĉielo (Mat 5,16). Por protestantoj tio sonas suspektinde: Ĉu ne sufiĉas la kredo? Sufiĉas, sed ĝi devas havi praktikajn konsekvencojn, ĉiuj bibliaj libroj postulas bonajn agojn. Kaj kial ni faru bonajn agojn? Por ke la nekredantoj klare ekkonadu: Tiu estas agema rilatanta Dion!

## Kerno de ĉiuj pekoj

Laŭ Sankta Skribo kerno de ĉiuj pekoj baziĝas en tio, ke ne estas honorata Dio. Sekve de tio estas klopodo de la kristano zorgi, ke Dio estu honorata, por ke do laŭeble ĉiu homo agnosku lian gvidforton en la vivo. Tio estas, kiel diras prof. Maier, „entute ĉiu senco de kreo de la homo“. Bonaj faroj dume ne povas nur konsisti el distribuo de la mono. Bonon al la aliulo faras tiu, kiu al li dediĉas tempon, korfavoron, gastemecon. Neganton de Dio nenio pli konvinkas, ol se li vidas: Dio povas la homon tiel ŝanĝi, ke li faras bonon ankaŭ al siaj kontraŭuloj. En unu studaĵo de la revuo „Psychologie heute“ oni skribas, ke la generacio de tridekjaruloj kaj de pli aĝaj estas generacio de egoistoj. Sed se la egoistoj ekspertas, ke ĉe la kristanoj ĝi estas alia, ili malfermos sian pardonon al Kristo. Kiam antaŭ pli ol unu jaro okazis granda tertremo en Pakistano, komencis muzulmanoj interesiĝi pri la kristana kredo. Motivo: ili vidis, ke la kristanoj el eksterlandoj disdonas kovrilojn kaj tendojn ankaŭ al muzulmanoj, kiuj la kristanojn persekutadis. Bonfaroj estis „lumfajroj sur la dezerto“, kiel skribis la misia gazeto.

La kristanoj de la eŭropa Okcidento longe vidis en Usono sian modelon. Sed nuntempe estas tie evangeliana movado en granda krizo. Nur 4 % de gejunuloj volas en maturaĝo resti en tiu ĉi movado. La studo vidas kaŭzon en tio, ke inter la predikado

kaj la vivstilo de la plenkreskuloj estas granda abismo. En Germanio konstatis unu ĵurnalisto, ke pri la kristanoj en televido tute mankas parolo, kaj do tial, ke ili tiel malmulte diferenciĝas disde tiu ĉi mondo. Ni ĉiuj devus zorgi, ke tio ŝanĝiĝu.

### **3. Antikristo enestas ankaŭ en la eklezio**

Se la unuaj du antikristecaj modeloj alvenas de ekstere, la tria alvenas de interne – el la eklezio. Antikristo enestas en la eklezio mem. En 1-a Letero de Johano (2,22) ni legas: Tiu estas Antikristo, kiu neadas, ke Jesuo estas Filo de Dio. Manfred Seitz al tio diras: „Tio estas tiuj, kiuj diradas nur Jesuo, sen diri Kristo. „Jesuologoj“, kiuj konsideras Jesuon kiel grandan moralan instruiston, sed ne kredas je nia Sinjoro kaj Savinto.“ Ĉar multaj eklezioj tion ne vidas klare, ekestas grandaj konfuzoj kiel en la ekleziaj komunumoj, tiel ankaŭ en medioj. Irana prezidento antaŭ kristnasko deklaris: „Kun granda Dia beno komenciĝis forkalkulo de malapero de Israelo. Israelo devas esti forigita, por ke sur la mondon revenu paco.“ Tiu ĉi raporto en la germana gazeto montras, kiel granda konfuzo ekzistas en la demando pri Dio, ĉar la Patro de Jesuo Kristo povas apenaŭ entuziasmiĝi pri ekstermo de sia elektita nacio.

### **Granda diferenco**

Hamburga magazino „Spiegel“ tial povis komenci generalan atakon kontraŭ ĉiuj monoteismaj religioj – judaismo, kristanismo kaj islamo -, ĉar ĝi opinias, ke inter ili ne ekzistas diferenco kaj ĉiuj tri estas laŭ ĝi same perfortecaj. Sed dum Kristo alvokis al la amo al malamikoj, Mohamedo alvokas al la milito kontraŭ ĉiuj neislamanoj. Laŭ Korano Jesuo estas nura profeto, sed ne la Filo de Dio; kaj eĉ ne estis krucumita, kaj nek resurektis.

Tial ĉiu, kiu en la naiva nescio proklamas, ke la muzulmanoj kaj kristanoj kredas je unu la sama Dio, parolas antikriste. Ĉiu, kiu sur la lokon de Kristo starigas nur bonon

kaj modelon, agas antikriste. Multaj estas loginstigitaj sl tia „jesuologio“, ĉar tio alportas aplaudon, se ili pri si proklamas: „Mi estas tolerema!“ Antikristeco ĉi tie kaŝiĝas sub masko de bono, tial ekestis tia kriado, kiam Kardinalo Maisner malpermesis en la lernejoj komunajn preĝojn de la kristanoj kun muzulmanoj. Alah ne estas Patro de Jesuo Kristo, kiu nin liberigis de la peko kaj morto.

### **„Klerikala korekteco“**

Kiu aŭdacas tion publike proklami, estas rigardata kiel netolerema. Kaj ĉar „fundamentalismo“ estas por multaj la plej malbona indiko, apartenas al la „klerikala korekteco“ silenteme preteriradi kaj mencii nenion, kio en la Nova Testamento estas nomata Antikristo. Sed per tio estas rekte prisilentata mem la ŝlosilo al la eterneco. Ĉar Jesuo Kristo kiel kriterio, ĉu ni eniros ĉielon, aŭ en la inferon, indikas konfeson al la Sinjoro de la Historio: „Ĉiun do, kiu konfesos min antaŭ homoj, mi ankaŭ konfesos antaŭ mia Patro, kiu estas en la ĉielo. Sed kiu malkonfesos min antaŭ homoj, tiun mi ankaŭ malkonfesos antaŭ mia Patro, kiu estas en la ĉielo“ (Mat 10,32-33).

La ĉielon por ni ne fermos kiu ajn peko, sed manko de la kuraĝo konfesi nin al Jesuo kiel al Kristo. Unu el la plej grandaj pekoj de la nuna tempo estas malbraveco.

Ĉu vi protestis, kiam vi dum la Diservo renkontis malveron kaj konfuzon? Minimume ĉiu, kiu scipovas legi kaj skribi, povas skribi sian proteston kaj enmeti ĝin en la kesteton aŭ en la monkollektujon. Kiel venki sian malbravecon? Ĉi tie al ni helpas, se ni nian vivon rigardos el ĝia fino, de la lasta juĝo. Ĉi tie ja ĉiu homo prirespondos ĉion, kion li faris aŭ ne faris. Ĉi tie decidiĝos pri la eterneco en la ĉielo, aŭ en la infero; en proksimeco de Dio, aŭ en absoluta disigo de Dio. Metu en ĉiu decida situacio la demandon: Ĉu mi kun tia decido sukcesos ĉe la lasta juĝo? Se ne, mi do devas diri ne, se mi

volas havi la vivon kun pozitiva kaj eterna perspektivo. Malgraŭ ebleco de la plej bonaj perspektivoj estas inter la kristanoj, kaj eĉ inter la naŭdekjaruloj, tiuj, kiujn timegas la morto. Dume ni devus en atendado de la ĉielo salti pro ĝojo.

### **Sen ajlo...**

Eble helpas al ni tiu ĉi anekdoto: La geedzoj venis en la ĉielon. Ili ricevis grandan loĝejon kun multaj fenestroj. La virino eklamentis: „Mi havas isĥiaton kaj mi ne povas purigi tiom da fenestroj.“ La anĝelo trankviligis ŝin: „En la ĉielo estas nek isĥiato nek malpuraĵo, nenion vi devas purigi.“ Poste la anĝelo ilin kondukis en belan manĝejon. Al la viro ŝajnis la manĝo tro graseca: „Tion mi ne povas manĝi, mi havas altan ĥolesterolon.“ La anĝelo diris al li: „En la ĉielo ekzistas neniuj problemoj kun ĥolesterolo.“ Jen turnis sin la edzo al la edzino dirinte: „Vidu, sen viaj ajlaj pateloj ni

povis loĝi ĉi tie jam delonge!“

Ni la kristanoj ne devas timi pro la morto. Tio estas la granda privilegio, ĉar antaŭ nenio la homoj pli multe timas. Persekutanto de la kristanoj Nikita Ĥruŝĉov foje respondis al la demando, kial li ne estas kristano. „La kristanoj ankaŭ ne ŝatas morti, ili timas.“ Evidente li havis malbonajn modelojn por sia ekiro al la plej alta kariero. La plej granda negacianto de Dio Friedrich Nietzsche (1844-1900) antaŭ la fino de sia vivo ekplendis: „Ve al tiu, kiu havas neniun patrujon!“ Nian respondon eldiris jam sankta Paŭlo: „Sed nia patrujo estas en la ĉielo, de kie ni atendas nian Savinton Jesuon Kriston“ (Flp 3,20). Kiel kristanoj ni povas trankvile kaj en motivita espero atendi nekredeble belegan estontecon kaj morti kun antaŭĝojo pri ĝi. Dietrich Bonhoefer (1906-1945) tion esprimis trafe: „Ni devas vivi tiel, kvazaŭ la hodiaŭa tago estus nia la lasta.“ ■

*El Komma 39/2007*